Christian Morgenstern,

# La lupfantomo

*tradukita de Bertilo Wennergren*

Jen lupfantom' de famili'
meznokte iam kuris for
al tombo de la profesor'.
kaj petis pri konjugaci'.

Do diktis tiu dokta ul'
starante sur la kructabul'
dum lup' senmova kiel splinto
atentis vortojn de l' mortinto.

De "lupfantomo", simpla rekta,
tra "lupfintomo", plej perfekta,
plu "lupfontomo", iom rara,
ĝis "lupfuntomo", ho, koŝmara.

Ĉi participoj plaĉis multe
al la fantomo, kaj rezulte
ĝi petis: "Legu plu el PIV-o
pri participoj en pasivo."

La viro ĉagreniĝis tamen:
"Jam fermis mi per fin' kaj amen,
ĉar netransiraj bestoj feblas
kaj la pasiv' neniam eblas."

Sed lupfantomo pri transiro
ja spertas pli ol eĉ vampiro.
La lup' revenis larmokula
al sia famili' ulula.

. . .

Christian Morgenstern,

# The Banshee (An Approach)

*tradukita de Max Knight*

One night, a banshee slunk away
from mate and child, and in the gloom
went to a village teacher's tomb,
requesting him: "Inflect me, pray."

The village teacher climbed up straight
upon his grave stone with its plate
and to the apparition said
who meekly knelt before the dead:

"The banSHEE, in the subject's place;
the banHERS, the possessive case.
The banHER, next, is what they call
objective case–and that is all."

The banshee marveled at the cases
and writhed with pleasure, making faces,
but said: "You did not add, so far,
the plural to the singular!"

The teacher, though, admitted then
that this was not within his ken.
"While bans are frequent", he advised,
"A she cannot be plurized."

The banshee, rising clammily,
wailed: "What about my family?"
Then, being not a learned creature,
said humbly "Thanks" and left the teacher.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Der Werwolf" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de Bertilo Wennergren.*

*Arg-825-1653 (2013-02-14 23:29:47)*

*Vidu la retejon* http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html.

*Traduko de la Germana poemo "Der Werwolf" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en la Anglan de* Max Knight *(civila nomo: Max Kühnel, ∗1909-06-08 – †1993-08-31).*

*Arg-825-1660 (2013-02-13 22:36:06)*

*Tiu ĉi angligo troviĝas en* http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html. *Pri la tradukinto Max Knight vidu:* http://www.jbeilharz.de/morgenstern/morgenstern_poems.html *kaj* http://www.123people.de/ext/frm?ti=ersonensuche%20telefonbuch&search_term=mx%20k%C3%BChnel&search_country=DE&st=suce%20nach%20personen&target_url=aHR0cDovLd3dy5saXRlcmF0dXJoYXVzLmF0L2luZGV4LnBocD9pZD020Dc4.